Mia fratinetino estis akceptita de onklino, en malriĉa domo ĉe strato Paulino Fernandes kaj tie estas edukita; mi ne volis vivi kun ili ĉar li, la fripono, pro timo de skandalo, provizis ilin per vivpano. Inter ni — li kaj mi — neniam ligiteco povus ekzisti krom tiu de malamo, antaŭ la veno de la horo de venĝo. Ankaŭ por tio, por ne perdi ĝin, mi ne akompanis mian baptopatrinojn en Eŭropon. Pro tio mi estas ĉi tie kaj en ĉi tiu situacio. Sed la malicega Santos Lobo li jam reguligas sian konton tie en la alia mondo!

Afranio Peixoto
Tradukis Y

ĈAJOTO (Chuchu)

Em nenhum dicionário esperantista encontra-se ainda este termo. Somente a revista "Sciencia Gazeto", em seu número de janeiro-fevereiro de 1933 o insere, dando sua classificação botânica: *Sechium edule* Swartz. Também foi classificado como *Chayota edulis* Jack. É o nosso conhecido, útil e apreciado *chuchu*, cujo nome nos veio do francês *chouchou* (*choochoo* dos colonos ingleses, segundo Caminhoá), e em outros países conhecido como *caiota*, *chayota*, *chayotte*.

A Enciclopédia e Dicionário Internacional acrescenta que, além do fruto, tão apreciado, esta cucurbitácea "fornece brotos tenros, que igualmente são estimados na culinária".

BIBLIOGRAFIO

LERTA VIRINETO — Reverkita de Sjung Saj-seng kaj Ju Gin. Pentraĵoj de Cen Juan-du. Esperantigis Zekun. Cina Esperanto-Ligo, Pekino 1957. 46 tute ilustritaj pagoj, kies pentraĵoj montras la mirindan historion de kamparano kaj lia magia edzino. Ciun bildon priskribas Zekun, ce la suba parto de ĉiu pago.

VOLTATIE KIELITAITOON — *Vilho Setälä* — (Privilegia Vojo al Lingoscio: Esperanto) Fondumo Esperanto-Helsinki, Esperantotie 4, *Matinkylä* (Ce Helsinki), Finnlando. 124, pagoj. 1958. Moderna, bonega lernolibro por memlernintoj de Esperanto, kiuj "povas senplue legi de la unua pago, sen vortaro aŭ gramatiko, komprenante ĉion, kaj daŭrigi la legadon senhalte, aŭ kun modera ripetado, ĉiam komprenante la enhavon sen helpiloj". La lernolibro, kiu plenigas mankon en nia literaturo, estas facile adaptebla por lernantoj de ĉiu ajn nacia lingvo, kaj Fondumo Esperanto-Helsinki deziras doni solrajton al unu eldonanto en ĉiu lingva aŭ geografia tereno.

MALMÖ-SVEDUJO — Turista multkolora faldprospekto en Esperanto, kun priskribo de la antikva urbo naskiginta en la XIII-a jarcento, nune la hodiaŭa belega somerurbo, kie en 1958 estigis moderna stadiono kun lokoj por pli ol 30.000 rigardantoj.

Senkoste havebla ĉe Malmö Turisttrafikörening, Malmö, Svedujo.

VARSOVIO INVITAS VIN! Tre interesa prospekto de la glora urbo, nombraj ilustraĵoj de la precipaj vidindaĵoj kaj historiaj priskriboj de la pola cefurbo. En la fino, informoj por turistoj.

KVARPIEDA KAMARADO — Taglibro de kelkaj monatoj kun Siam katido, de *Marjorie Boulton*, 1956. 48 pagoj, kun portreto de la verkistino kaj 8 interesaj kataĵ bildoj.

La ŝatata aŭtorino dediĉis tiun libron al sia Esperantista geamikaro, por kiu ŝi presigis ĝin. Jen kion ŝi deklaris: "Ĝi estas aŭtentika, spontanea taglibro kiun mi verkis nur por amuzi min mem kaj presigis nur por amuzi aliajn".

Kaj vere ĝi amuzas.

CENT GOJKANTOJ — *Marjorie Boulton*. Antaŭbildo de *Reto Rossetti* 48 p. 1957. En la enkonduko de ĉi tiu

juvelo, M. Boulton skribis: "La mondo, kiel mi konas ĝin, estas dolorplena, kaj ĉiu felice, ĉiu plezuro ŝajnas kiel bela eta gloro kiu kreskas en rok fendajo".

Vere, per siaj gojkantoj la poetino celis iomete helpi al la homaj gefratoj pli serĉi tiujn iloretajn en la rok fendajoj. Dankon, do!

NI PAROLU EN ESPERANTO — *Cours de langue internationale Esperanto* par *André Ribot*. Editions Françaises d'Espéranto. 11, rue Paul-Vergnes, Marmande (Lot-et-Garonne) Francujo — 160 p.

Praktika metodo, en 12 lecionoj, kun multaj ekzemploj kaj pecoj por vraduko.

ESPERANTA LEGOLIBRO — *Elio Miguorini* — 4-a eldono, plene revizita kaj pligrandigita. A. Paolet, San Vito al Taguamento, Italujo. 214 p. 1958. Prezo 14 steloj.

Verko rekomendata de Itala Instituto de Esperanto. Ĝi havas tri partojn: Tra la vivo, tra la lingvo, tra la literaturo. Bonega legolibro, por novaj samideanoj, kiuj konatigos kunnovaj kaj malnovaj verkajoj Esperantaj; kaj ankaŭ por malnovaj samideanoj, kiuj per ĝi rememorigos interesajn legajojn de verkoj el la unuaj tempoj de nia lingvo.

FAKTOJ PRI GERMANUJO — *Prof. D-ro Heumut Arntz* — Esperanta traduko de *Deutschland im Überblick*, eldonita de la gazetara kaj Informa Oficejo de la Federacia Registaro. 72 p. 1958. La du kovriloj prezentas bildojn de la Farbofabrikoj-Bayer.

Multnombraj ilustraĵoj kaj bonegaj sciigoj, tabeloj, mapoj kaj bildoj pri la Okcidenta Germanujo (strukturo, politiko, ekonomio, kultura kaj socia vivo).

Petoj, kun respondkuponon, al *Deutscher Esperanto-Bund*, Bergisch Gladbacher Str. 1095 — Köln — Dellbrück.

ALMANAKETO — Literatura aldonon al "Esperanto en Slovakio". Eldono de Esperanto-rondeto ce kleriga domo-Martin. 68 p. dec. 1958.

Tiu Almanaketo kompletigas la du jarkolektojn 1957-58 de "Esperanto en Slovakio", per verkajoj poeziaj kaj prozaj, kiujn oni legas plezure.

SENNACIECA REVUO — 1959 — Leginda kajero, dediĉita precipe al L. L. Zamenhof kaj al E. Lanti (centjareco kaj okdekjareco). Kelkaj el la bonegaj artikoloj: Nekonato — la Zamenhof-

homarismo; Latineco triumfanta; Hieraŭa, hodiaŭa kaj morgaŭa Gvineo.

JUNULARO DE BULGARIO — Jaro I, n-roj 1, 2, 3, — aŭgusto, oktobro, decembro 1958. Dumonata ilustrita revuo en Esperanto (aperas ankaŭ en rusa, angla, franca lingvoj) Centro Komitato de Dimitrova Asocio de la Popola Junularo. Bul. Stambolijski, 11, Sofio, Bulgario.

ALKO KAJ SUNA EN SIAJ DU DOMETOJ. *Verna Hills* — Trad. el la angla lingvo de *Rüdiger Eichholz* — Kun ilustraĵoj de Stanley Cooper. Eld. de Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado. 80 p. 1958. Originala broŝuro. Tre interesa verko, enhavanta historietojn skribitajn por infanoj. Simpla, eduka verko, sen la kutimaj kruelaĵoj kaj ruzaĵoj. Taŭga por denaskaj esperantistoj 3-6 jaroj kaj ankaŭ por pli aĝaj.

L' UNIVERSITÉ POPULAIRE EUROPÉENNE — Revue de l' Association Européenne des Universités populaires. n.º 1, jan. dec. 1957.

LA EŬROPA POPOLUNIVERSITATO, oficiala gazeto de la Eŭropa Asocio de Popoluniversitatoj n-ro 1, Jan. Dec. 1957.

Tre interesa dulingva revuo. Ĝi enhavas, en Esperanto kaj franca lingvo: paroladoj, raportoj kaj konkludoj de la Unua internacia Konferenco de la Popoluniversitatoj.

BIOGRAFAJ INFORMOJ PRI D-RO L. L. ZAMENHOF. *Roland Josinet* (Paris) — Lia vivo, Ĥaj vojaĝoj, kun indiko de datoj, lokoj, okazaĵoj, referencoj (Ced-Inte. 7) Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono. Ekzemplero havebla de la C. O. de U.E.A. je prezo de 1 resp. kupono.

FOLIOJ EL LA BILDOLIBRO DE DIO KAJ PENTEKOSTA BRILO SUPER LA VIVO. *Martinus* — 96 p. bindita. La Spirita Scienco Instituto de Martinus, Kopenhago 1958. Propra prezo.

Interesa, facila legado. Tradukita el la dana originalo de la konata esperantisto C. Graversen, bedaŭrinde mortinta, 73-jaraĝa, la 21-an de oktobro 1958.

JAPANA KANTARO — 64 p. memore de la 44-a Japana Esperanto-Kongreso, Nagoya, 1957. kompilita de Kantarotraduka grupo de Nagoya Esperanto-Societo. Eldonis Amo-Akademio. Tenmori, Kozoji Aiĉi-Ken, Japanujo.

UNITARISMO — REALIGITA HOMARANISMO. Kompilita kaj tradukita el la angla, de *Rüdiger Eichholz*, 60 p. 1958. Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado. Interesa broŝuro kun la intenco informi la tutmondan esperantistaron pri unitarismo.

TRI SATIROJ — Meditado de ordinara bovo serba (*Domanoviĉ*), Mortanoncoj (*Milĉinski*) kaj Travivaĵoj de *Nikoletina Bursać* (*Copiĉ*). Humoraj verkaĵoj sub la redakto de *Drago Kralj*. Kun ilustraĵoj. 1957 — Eldonis Slovenia Esperanto-Ligo, Mikloŝioĉeva 7, Ljubljana, Jugoslavio.

KONSTRUTEKNIKA TERMINARO SVEDA-ESPERANTA KAJ ALILINGVA — Kompilita de *K. J. Moberg*, Konstruĝingenero, 100 p. 1958 — Eldona Societo Esperanto — Malmö 7, Box 7043, Svedujo. Dua parto prezentas la Esperantajn terminojn kun difino en la internacia lingvo.

SALTO TRA JARCENTO — Broŝuro enhavanta dek interesajn karikaturojn de la fama franca karikaturisto *Honoré Daumier* (1809-1879), pri scenoj de lia tempo, dum veturado en la unuaj fervojoj; kaj vidalvide sur la alia paĝo, aperas bildoj montrantaj la avantaĝojn kaj plezurojn de la nuntempaj vojaĝoj en la trajnoj de la Germana Federacia Fervojo.

LA PLUGILO — Bulteno de la Bruderhofaj Komunumoj — Society of Brothers, Bromdon, Bridgnorth, Shropshire, Anglujo.

Societo de Gefratoj, grupo de homoj el preskaŭ 20 naciecoj, kiuj kunvivas en 11 bruderhofaj komunumoj en Anglujo, Germanujo, Usono, Paragvaĵo (kun hospitalo ĉe Primavera), kaj Urugvaĵo. La movado komenciĝis post la unua milito.

WIEN ĈIAM HAVAS SEZONON — Propaganda prospekto kun belaj bildoj de Vieno kaj priskribaj klarigoj aldonoitaj, en Esperanta traduko de *Hugo Steiner*.

THE WAR RESISTER — *Internacio de Militrezistantoj.* (Anglujo) *The Peacemaker* — (Sydney, Aŭstralio).

Publikajoj de la porpacaj laborantoj, kies deklaro, por esti akceptata kiel membro, estas:

“Milito estas krimo kontraŭ la homaro. Mi, do, firme decidis ne subteni ian ajn militon kaj penadi forigi ĉiujn kaŭzojn de milito”.

JARLIBRO — 1959 de Internacia Katolika Unuigo Esperantista-32 p. Aldono al "Espero Katolika" — Krom diversaj informoj, listoj de reprezentantoj, Esperanto-kluboj kaj konsuloj de I. K. U. E., ĝi enhavas ankaŭ la Statutojn de I. K. U. E.

JARLIBRO — de la Universala Esperanto-Asocio 1958 — Dua parto 223 p. Reaperis la fakterminaroj. Ĝi enhavas la "Gastronomia Terminaro" (125 p), kun fakterminaroj por kelneroj kaj kuiristoj en la lingvoj Esperanta, angla, ĉeĥa, kaj franca. Ĉi tiu Terminaro, de Erhard Urban, aperis ankaŭ kiel aparta eldono.

ESPERANTO PAROLATA — Unua Esperanta Adresaro de la entreprenoj, kiuj uzas Esperanton. 1958. M. Retot, 162 boulevard Aristide Briand, Montreuil (Seine) France.

C.C.

ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

ALBÂNIA — Pela primeira vez após a grande guerra, organizaram-se cursos de Esperanto em uma Faculdade de Tirano, sob a direção do engenheiro Remzo Fico.

ALEMANHA — Nosso amigo, samideano engenheiro Alberto Flores fez aplaudida preleção sobre o movimento esperantista no Brasil, no dia 20 de dezembro de 1958, na reunião festiva realizada em Wuppertal, em homenagem à data do nascimento do dr. L. L. Zamenhof.

Por ocasião do 43.º Congresso Universal de Esperanto, em Mogúncia, fundou-se a Liga Universal de Estudantes Esperantistas — *Studenta Tutmonda Esperantista Ligo* — STELO — como seção de ISAE (*Internacia Scienca Asocio Esperantista*).

O Sr. Paul Ciliga, presidente de STELO, faz um apêlo para que os estudantes de escolas superiores e respectivas associações forneçam seus endereços ao secretário de STELO (J. C. Wells, Trinity College, Cambridge, Inglaterra). Todas as forças estudantis devem colaborar para o progresso do Esperanto nas Universidades, base necessária para sua introdução nas escolas e final oficialização.

ARGENTINA — O Décimo Congresso Argentino de Esperanto realizou-se festivamente em Santa Fé. A sessão inaugural, na *Casa del Maestro*,

teve como orador a S-ra Elba J. Freyre de Natella, presidente do Conselho De-liberativo de Santa Fé, perante grande e seleta auditório.

ESPANHA — Realizou-se, de 24 a 27 de julho, o 19.º Hispana Esperanto Kongreso, em Castellón, bela cidade próxima de Valencia. Compareceram cerca de 200 samideanos, entre eles alguns de Portugal, França e Flandres. Aos diversos arranjos do costume não faltou a conferência, feita pelo prof. Delfi Dalmau. Os organizadores do Congresso distribuíram artísticos prospectos coloridos.

Em Mauresa, cidade da Catalunha, foi inaugurada a rua Zamenhof.

FINLÂNDIA — O 31.º Congresso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) realizou-se na capital finlandesa Helsinki. Compareceram 254 congressistas, de 16 países (2 do Brasil).

Foi brilhante congresso, em nada desmerecendo dos anteriores.

GUATEMALA — O novo Ministro dos Negócios Interiores, sr. Edmundo Quinones S., é um dos mais entusiastas membros da diretoria de Guatemala Esperanto-Asocio.

HUNGRIA — Em cinco meses esgotou-se a edição de 5.000 exemplares do Dicionário Esperanto-Húngaro, publicado pela editora da Academia de Ciências.

ITÁLIA — O Presidente da República Italiano concedeu ao professor Giorgio Canato, presidente de U.E.A., a Medalha de Ouro de Mérito em Instrução, Cultura e Artes.

Na pitoresca Palermo, capital da Sicília, realizou-se o 29.º Congresso Italiano de Esperanto. Tomaram parte cerca de 300 esperantistas.

IUGOSLÁVIA — A importante revista esperantista "*La Suda Stelo*" (agosto de 1958) trouxe interessante artigo de Lin Tsien, do Rio de Janeiro, sobre Eustórgio Wanderley, o conhecido poeta e pintor, muito amigo do Esperanto.

O Chefe do Estado, marechal Tito, que sabe Esperanto, recebeu afetuosamente, por ocasião de seu 66.º aniversário natalício, uma delegação da Liga de Esperanto Iugoslava. Tito é membro da Liga e paga regularmente sua quota anual. De 4 a 7 de julho houve o 17.º Kongreso de Jugoslaviaj Esperantistoj, em Novi Sad, com a assistência de cerca de 600 samideanos.

RECENZO

G. Waringhien. *GRAND DICTIONNAIRE ESPERANTO-FRANÇAIS* — *Lib. Centrale Espérantiste, Paris, 1957. 1 vol. tolbind. 368 p. 14 x 19,5 cm. Prezo: Cr\$ 900,00 en la libro-servo de B.E.L.*

Belan verkon ĵus donis al la mondo esperantista la eminenta kaj senlaca akademiano Prof-ro Gastor Waringhien per sia "Grand Dictionnaire Esperanto-Français". Mi povas ĝuste taksu la grandegan penadon, kiun ĝi ja postulis de la klera kompilinto, ĉar mi mem estas kunaŭtoro de vortaro.

Memkompreneble, nenia vortaro estas kompieta; en ĉiuj mankas io aŭ alia, kion la verkinto pretervidis aŭ pri kio li opiniis, ke ne estas necese ĝin enpreni. Tiajn mankojn oni rimarkas ankaŭ en ĉi tiu recenzata verko, inkluzive de artikoloj registritaj en la P. V. kaj ties "Suplemento". El la verkoj mem de Zamenhof kaj de Kabe, krom aliaj, Prof-ro Waringhien povus esti ĉerpinta ankoraŭ multe da vortoj. Malgraŭ do lia kio-podado por prezenti eĉ ne komunuzajn radikojn, tamen elglitiĝis ne malmultaj; kaj kiel radikoj, tiel ankaŭ mankas kelkaj ordinara derivajoj. Tamen feliĉajn arangojn li prezentas, kun traduko eĉ laŭ franca popola parolmaniero, kio estas ja tre interesa kaj instrua.

Kelkaj punktoj meritas apartan rimarkon, ĉar pri ili oni povus ne tute konsenti kun la kompilinto; bedaŭrinde, pro nesufiĉa spaco, mi ĉi tie ne povas pri ili pli vaste paroli. Tiel ekzemple:

a) Bibliaj propraj nomoj, skribitaj laŭ diversa normo.

b) Vortoj rilataj al "historiaj" mezuroj k. a., skribitaj aĉe, ol en la Biblio, kaj tamen forgesitaj alaj.

c) Apartigo de fina "a" en primitivaj propraj nomoj, eĉ de grekaj literoj.

ĉ) Radikoj memstaraj kvazaŭ "derivajoj". Sur ĉi tiu kampo Prof-ro Waringhien prezentas ekz-e "atoro", por signi "mekanisman": kaj "administratoro", "propagatoro", "reformatoro", "spektatoro", "uzurpatoro",...? Kaj "alkaloido" en "alkalo"; "metanolo" en "metano"; "peseto" (monunuo) kvazaŭ diminutivo de "peso" (ankaŭ monunuo), ...?

d) Kontraŭe: derivajojn li memstarigas: "reprezenti", "resumi", "retuŝi"; "diskrediti", "disproporcio". Cetere, pri "dis" kiel "mal" aŭ "sen" Prof-ro Waringhien tute ne parolas.

e) De kelkaj radikoj li ŝanĝis la gramatikan kategorion.

f) Difinoj kaj radikoj malsamaj ol tiuj en la P.V., inkluzive de la "Suplemento", kaj la komunuzaj.

g) Erara interidentigo de vortoj aŭ esprimoj: "detempe de" ne estas "de post"; "ehe!" ne "aha!"; "pa!" ne "ba!"; "nitro" ne "nitrogeno"; "sulfo" ne "sulfuro", k. a.

ĝ) Diversaspektaj gramatikaj neĝustajoj: "ne ankoraŭ" (kiun oni ne diras); "ĉj/o" kaj "nj/o", sufiksoj? La "REM." en "da" estas ne tute ĝusta; k. a.

h) Tradukeraroj: "erco" (p. 16) estas ne "minéral", sed "minerai"; "benzeno" ne "benzine", sed "benzène", kaj ne "com.", sed "ch."; "gango" ne "filon", sed "gangue"; "natro" ne "soude caustique, hydroxyde de sodium", sed "carbonate de sodium"; "preter", aĉmenaŭ sekvata de nominativo, ne estas "au-delà de", kaj "pretere" tute ne "au-delà"; "tiomaj" ne "si nombreux, tant de"; "tioma" estas *vica, orda*, adjektivo; k. a.

h) Lingva nesufiĉa observado, ekz-e: "al" estas uzata ankaŭ kiel "krom" kaj "ĉe"; "aspekti" ne nur "suivi d'un adverbe"; "pleje" ankaŭ kiel "plejparte" kaj "precipe", eĉ la simpla "plej"; krom "ĉitiera" estas klasikaj ankaŭ "ĉi tiea" kaj "ĉitiera"; k. a.

i) Apartan rimarkigon meritas la novaĵo, enkondukita de Prof-ro Waringhien, pri la ordo de enlistigo de korelativaj vortoj. Mi bedaŭras, ke mi ne konsentas kun la estimata kolego, kaj, memkompreneble, mi ne povus em malvasta recenzo elvolvi miajn motivojn de tia malsameco de opinioj.

j) Fine mi diru, ke mi rimarkis ankaŭ plurajn preserarojn, inkluzive en ia "Erratum", krom tiuj, presitaj sur aparta folio de la verko mem, kaj du preterviditaĵojn: p. 8 — mankas "bazaro", kiel sur la p. 9; p. 12 — la paĝo de "Lingvaj Respondoj", tiel menciita, estas ne 54, sed 63/4, de tiu sama 3-a eldono.

Malgraŭ ĉiuj siaj neperfektaĵoj, kies ekzistado estas tute komprenebla, la "Grand Dictionnaire Esperanto-Français", de Prof-ro G. Waringhien, estas inda je ĉia laŭdo kaj varma rekomendo. Ĉi tiun mian recenzon li prenu ne kiel ian maŝplivalorigon de lia bonega verko, sed kiel sinceran kunlaboron por la espereble baldaŭna dua eldono.

Porto Carreiro Neto, Ak.

Ivo Lapenna — RETORIKO — Kun aparta konsidero al Esperantlingva parolarto. — Verkita originale en la Internacia Lingvo. — Dua eldono reverkita kaj kompletigita. — Rotterdam, 1958. 1 vol. tolbind. 294 p. 14 x 20 cm. Prezo: br. Cr\$ 500,00, bind. Cr\$ 600,00, en la libroservo de B.E.L.

Se ekzistus neniu alia libro en Esperanto ĉi tiu sufiĉus por eternigi la Lingvon Internacian, ĉar neniu alia lingvo posedas verkon tiel elstaran pri la temo.

La unua eldono estis modeste prezentita en 1950, sed al ĉiuj ĝi plaĉis kaj rapide disvendiĝis; ĉi tiu dua eldono estas pli dika, havas plian antaŭparolon kaj estas lukse tolbindita por libro-amikoj.

La antaŭparolon al la dua eldono verkis Prof. G. Waringhien.

Antaŭ ol instrui la parolarton, pri kiu la Aŭtoro estas vere kompetenta, la libro prezentas interesan studon pri la homa lingvo. Ĉi tiu parto estas 118-paĝa traktado kaj instruas nin pri la formado de la lingvo ekde la plej primitivaj idiomoj ĝis Esperanto, kiu estas la kvintesenco de la homa lingvo.

Tiun lingvistikan parton oni povus presi ankaŭ kiel apartan volumon, kiu estus tre utila en ia manoj de niaj samideanoj, ĉar la tiea studo pri Esperanto estas ĝisfunda kaj konvinkiga. Pri Esperanto mi kopias nur unu penson de la Aŭtoro:

"Tiamaniere la Internacia Lingvo estis, ekde sia naskiĝo, la plej pura esprimo de vivanta sento de aparteno al la homaro. Kiel tia ĝi, siavice, daŭre fortikigis kaj fortikigas tiun senton." (pĝ. 105).

La Dua Parto — Retoriko — estas tre detala, plenigas de tre interesaj instruoj 128 paĝojn. Em Aldono 21-paĝa estas modeloj de paroladoj.

Ĉiu esperantisto fieros posedi kaj studi ĉi tiun belan libron.

Mi nur bedaŭras, ke mi ne havis similan verkon antaŭ 50 jaroj, kiam mi komencis serion da mallerte preparitaj paroladoj. Kiom da eraroj mi ne estus farinta!

I.G.B.

Julio Baghy — "SONĜE SUB POMARBO". Triakta lirika

komedio en ses fantaziaj bildoj. Kun antaŭparolo de Marjorie Boulton. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj 1958. 1 vol. broŝ. 221-paĝa, 16 x 22 cm, 4 tutpaĝaj bildoj de la scenejoj. Prezo: Cr\$ 320,00 en la libroservo de B.E.L.

En la Bel-Literatura Eldon-Serio "Stafeto" ĉi tiu volumo havas la n-ro 14. En kelkaj jaroj afrika urbo donis al la mondo 14 juvelojn! Brave!

Unue nin kortuŝas la bela antaŭparolo de Marjorie Boulton, la talenta poetino de "Kontralte" kaj "Cent Ĝojkantoj", kiu adoras la Aŭtoron kaj prezentas lin al ni kiel genian poeton kaj modestegan, bonkoran homon. Ŝi amplena nomas lin "Paĉjo".

La teatraĵo estas bela poemo plena de fantazio, kiu memorigas nin pri "Faŭsto" de Goethe, "Songo de Somermeza Nokto" de Shakespeare, "Peer Gynt" de Ibsen, "La Tragedio de l' Homo" de Madach, sed pli moderna, kun fantaziaj rakontoj pri la monstra scienco de la venontaj jarmiloj, senkora, materialisma, senespera.

Travivinte du mondmilitojn kaj kruelajn revoluciojn, la Aŭtoro estas miksaĵo de optimismo denaska kaj pesimismo akirita. Li estas nun 68-jara. Lia unua poemaro aperis antaŭ 37 jaroj, en 1922. Li estas do unu el la plej malnovaj poetoj en Esperantujo kaj certe el la plej talentaj. Lia stilo estas kristalklara, ĉarma, natura, kvazaŭ Esperanto estus lia gepatra lingvo.

La dialogoj en la teatraĵo kun kadenco kaj belaj rimoj fluas nature kiel bona prozo.

Ĉi tiu majstro-verko estas verkita originale en Esperanto Nia trezoro riĉiĝas senĉese. Pri ĉi tio ni fieru.

I.G.B.

ORA FIŜO — Bildteatro por infanoj de la mondo — Eldono de Amo-Akademio, Tenmori, Kozoji Aiĉiken, Japanujo. Dek bildoj sur kartono kun teksto en Esperanto kaj Japana lingvo. Formato 18 x 25 cm. Prezo: . . . Cr\$ 120,00 en la libroservo de B.E.L.

Ĉi estas simpligita teksto de mondfama fablo pri la puno de troa ambicio. Antaŭ ĉirkaŭ 50 jaroj tiu fablo aperis en ĝia tuta teksto en klasika traduko de Kabe. Nun niaj japanaj samideanoj bele resumis ĝin al dek bildoj por malgrandaj infanoj, kiuj povos lerni parkere la frazojn.

Flanke de la Esperanta teksto aperas la japana, tial la bildoj povos helpi la japanajn lernantojn de Esperanto por kompara studo.

Ĉian laŭdon meritas la eldonantoj de porinfana literaturo en Esperanto.

I.G.B.

Elio Migliorini — ESPERANTA LEGOLIBRO — Plene reviziita kaj pligrandigita — Eld. A. Paolet — San Vito al Tagliamento, Italujo, 1958 — 1,18 x 1,68 cm — 214 paĝoj — Prezo: ĉe B.E.L., Cr\$ 130,00.

Jam en kvara eldono aperas tiu libro de la itala profesoro, kun rekomendo de Itala Instituto de Esperanto. Pro pedagogiaj celoj ĝi estas prezentita en tri partoj: TRA LA VIVO, TRA LA LINGVO, TRA LA LITERATURO.

La unua parto enhavas, krom spritajoj kaj proverbaroj, legendojn kaj historiajn artikolojn. La spritajoj kaj anekdotoj estas bone elektitaj kaj trafas la celon, kiu estas distri. La proverbaroj, malgraŭ tio aŭ ĉefe pro tio, ke ĝi estas en legolibro, estas relative malgranda. Tamen ĝi estas instrua. La artikoloj, pro scienca karaktero, estas malfacilaj, neallogaj kaj eĉ iom enuigaj. La kunmeto de seriozaj sciencaj artikoloj tuj post ridigaj spritajoj ne havas bonan efikon.

TRA LA LINGVO estas la plej grava parto en la verko. Tie estas kolektita aro da altrangaj artikoloj de elstaraj lingvistoj. Tiuj artikoloj estas gravaj ne nur por komencatoj, sed ankaŭ por daŭrigantoj, kiuj havas okazon solvi kelkajn malgrandajn dubojn pri gramatiko aŭ stilo en la internacia lingvo. Ankaŭ estas oportunaj la parolado de Zamenhof kaj la Deklaracio pri Esperantismo.

Originalaĵoj de famkonataj literaturistoj kaj tradukaĵoj el Dante, Goethe, Heine, La Fontaine, Virgilio, Ezopo kaj Ibsen, inter aliaj, estas enmetitaj en la tria parto, kiu havas ankaŭ tekstojn de la Nova Testamento. Rimarkinda estas la fakto, ke la prozaĵoj estas apartigitaj de la poeziaĵoj, malsame kiel en ceteraj samcelaj libroj. Inter la literaturaĵoj estas enmetita la rakonteto LA MI-OZOTO, de la brazila verkistino Rosália Sandoval, laŭ traduko de A. Caetano Coutinho.

Konklude, ESPERANTA LEGO-LIBRO estas riĉa krestomatiaĵo por lingvoperfektiĝo aŭ por distro. Tamen estus bone se en la kvina eldono la aŭtoro ŝanĝus la ordon de la du unuaj partoj (unue, TRA LA LINGVO; du, TRA LA VIVO) kaj se la tria estus pligrandigita per unu aŭ du teatraĵetoj.

J.V.M.

RIDU, NI PETAS

Tre malfrue

Se vi promesos al mi ne fumi antaŭ ol vi estos 21-jara, mi diris al miaj tri filoj — mi donos al ĉiu el vi po Cr\$. . . . 15.000,00, kiam vi havos tiun aĝon.

Mia 17-jara filino tuj parolis:

— Nu! Dek kvin mil kruzejoj! Bonege! Mi nepre promesas.

Mia 15-jara filo hezitis iomete:

— Mi pensos pri tio, ĉar mankas multe da tempo por ke mi faru 21 jarojn kaj ne placas al mi la ideo promesi ion ajn.

Mi min turnis al mia 10-jara filo, kiu nin aŭskultis kun embarasita mieno.

— Kaj vi, Joĉjo? — mi demandis.

— Domaĝe, paĉjo — li diris. — Kial vi ne proponis tion antaŭe?

—o(o)—

Psikologo estis submetinta junulon al testo pri personeco. Li strekis vertikalan linion sur pecon da papero kaj demandis:

— Kion prezentas al vi tio ĉi?

— Sekson. — respondis la junulo.

Poste, la psikologo designis rondon.

— Kaj ĉi tio, pri kio ĝi faras vin pensi?

— Pri sekso — diris denove la junulo.

Tiam la psikologo designis stelon.

— Kaj ĉi tio? li demandis.

— Pri sekso, kompreneble, rediris la juna viro.

La psikologo kuŝigis la krajonon sur la tablo.

— Miaopinie — li deklaris — vi havas obsedon pri sekso.

— Ha! ĉu do estas mi, kiu havas obsedon? — li ekkriis, indignita. Fi! Kiu faris tiujn maldecajn desegnojn, doktoro?!

Trad. L.A.M.

ANONCETO

Deziras korespondi pri ĉiuj temoj, letere aŭ bildkarte, kaj interŝanĝi esperantajn librojn, revuojn, ktp, dudek kvin-jara fraŭlino. Maria Siwinska, Mirków 33, Drugoleka, WROCLAW, Pollando.

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

OS BURROS

Alvaro Moreyra

É preciso acabar com esse desprezo. Ou com esse equívoco. Os burros não são burros. Olhem os olhos deles.

Eu gosto dos burros. De quase todos. Principalmente dos que andam, tão desgraçados, na dura lida, sobre as pedras das ruas, sobre o barro das estradas, ao sol, à chuva, dia e noite. Tristes, tristes. Sem uma queixa.

Que humildade! Que paciência! Que coragem!

Pensam para dentro. Não procuram impor nem a sua vontade, nem a sua opinião. Obedecem. Zurram. É um modo de dizer que não têm nada com isso.

Se foram à guerra, foram levados. Combateram os filisteus, resumidos numa caveira, que Sansão brandiu, criando o mais puro dos símbolos.

Mandaram representante ao nascimento de Jesus Cristo e forneceram o andor para entrada festiva em Jerusalém, como prova de que acreditavam na palavra dos profetas, mas com certeza não acreditavam.

Não é fácil julgar criaturas de tamanha discrição. Dos burros, além dos nossos pontos de vista, só possuímos a aparência. Aparência que varia conforme os nossos pontos de vista. Há quem os ache ridículos. Há quem os ache sublimes. São bonitos e são feios de acordo com os temperamentos.

Já existe tanta crítica, de tanta cousa. Para que crítica dos burros?

Bom é lhes querer bem, admiti-los tais quais se revelam, incapazes de aborrecer os outros inimigos da publicidade, calmos, silenciosos, delicados.

Talvez no mundo interior, conservem a alegria da infância, muito escondida, e continuem brincando com ela. O aspecto que vemos, vivido, será para uso externo: a inocência deteriorada.

Quanto ao coice... quem nunca deu um coice, que atire nos burros a primeira pedra...

Para confronto, virá no próximo número a tradução deste trecho.

NEKROLOGO

Murillo Furtado
(1873-1958)

En ĉiu tiu ĉefurbo mortis la 3-an de majo Murillo Furtado, unu el la indaj pioniroj de Esperanto en Brazilo. Li tradukis kaj adaptis al la portugala lingvo la broŝuron de la librejo Hachette,

de Paris: *Primeiro Manual da Língua Auxiliar Internacional Esperanto*, 1906, Milano.

Honora Prezidanto de Brazila Klubo Esperanto. Li ĉeestis la 2-an Universalan Kongreson de Esperanto en Genevo (1906). Muzikmajstro kaj ŝatata komponisto. Delegito de ŝtato Rio Grande do Sul, kie li naskiĝis, al la Milana Ekspozicio en 1906.



Pastro Modesto Eugenio Carolfi
(1884-1958)

74-jaraĝa, mortis nia eminenta itala samideano, esperantisto de 1912. Li tre multe laboradis por Esperanto. Aŭtoro de pluraj verkoj kaj nombraj gazetaj artikoloj favore propagandantaj nian lingvon. Li estis prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, de 1917 ĝis 1920, kaj ankaŭ prezidanto de IKUE (Itala Katolika Esperanto-Unuiĝo).

Francisco S. G. Schaden

Antaŭ kelka tempo ni eksciis pri la morto de nia veterana samideano Francisco Schaden, en São Bonifácio, ŝtato Santa Catarina, la 26-an de decembro 1957. Dum multaj jaroj li laboris por Esperanto, ĝis tion permesis lia aĝo kaj sano. Al lia filo, prof. d-ro Egon Schaden, ni prezentas nian kondolencon.

Eliseu Cesco

Mortis en la urbo São Carlos, ŝtato S. Paulo, la 20-an de januaro 1958 nia samideano Eliseu Cesar, malnova abonanto de B. E.

Annibal Carvalho

Letero el Bebedouro, ŝtato São Paulo, sciigis nin pri la forpaso el la mondo de nia malnova samideano Annibal Magalhães Carvalho, delegito de U.E.A. Al lia filo Alexis Landgraf Carvalho, nian sinceran kondolencon.

Francisco Oliva

En la aĝo de 59 jaroj forpasis en Jundiaí, ŝtato S. Paulo, nia samideano Francisco Oliva, fervoja inĝeniero. Kelkajn tagojn antaŭ ol li mortis, tiu entuziasma, sindona esperantisto faris ankoraŭ lecionon pri nia lingvo en la kurso, kiun li direktis.

BELOS LIVROS PARA PRESENTE

| | Cr\$ |
|--|----------|
| Antologio de Brazilaj Rakontoj. | |
| Br. 100,00 Enc. | 200,00 |
| Antologio de Portugalaj Rakontoj | 200,00 |
| Ezopa Saĝo. Kálócsay. Enc. | 280,00 |
| Grand Dictionnaire Esperanto- | |
| français. Waringhien. Enc. | 900,00 |
| Imitado de Kristo. Th. a. Kem- | |
| pis-v. zon. Enc. | 180,00 |
| Jarmiloj P'asas. Haerker. Enc. | 500,00 |
| Kataluna Antologio. Enc. | 550,00 |
| Intero. Dante-Kálócsay. Ilustr. | |
| Br. 300,00. Enc. | 500,00 |
| La Faraono. Prus-Kabe. 3 vols. | |
| Enc. | 800,00 |
| La Libro de La Spiritoj. Kardec- | |
| P. Carreiro Neto. Enc. | 120,00 |
| La Sankta Biblio. Trad. Zamen- | |
| hof. Enc. | 300,00 |
| La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo. | |
| Dickens-Butler. Ilustr. Enc. | 200,00 |
| Leteroj de Zamenhof. Waring- | |
| ghien. 2 vols. Enc. | 700,00 |
| Lingvo Kaj Vivo. Waringhien | 600,00 |
| Memorlibro de la 3-A Eŭkaristia | |
| Mondkunveno. Kao. Br. 150,00 | |
| Enc. | 250,00 |
| Nederlando. Van Vijk-Elias-Is- | |
| brucker. Ilustr. Enc. | 1.500,00 |
| Naŭlingva Etimologia Leksikono. | |
| Bastien. Enc. | 350,00 |
| Originala Verkaro. Zamenhof- | |
| Dietterle. Enc. | 560,00 |
| Plena Vortaro de Esperanto. Enc. | 500,00 |
| Quo Vadis? Sienkiewicz-Lidia | |
| Zamenhof Enc. | 500,00 |
| Retoriko. Lapenna. Br. 500,00 | |
| Enc. | 600,00 |
| Rui Barbosa. Nery-Joels. Br. | |
| 100,00. Enc. | 200,00 |
| Ŝlosilo por 12 Lingvoj | 200,00 |
| bowski Enc. | 350,00 |
| Sveda Antologio. Enc. | 700,00 |
| Ŝlosilo por 12 Lingvoj | 200,00 |
| Taglibro de Anne Frank. Trad. | |
| Degenkamp. Enc. | 400,00 |
| Teatro. Machado de Assis. Br. | |
| 80,00. Enc. | 200,00 |
| Tipoj Kaj Aspektoj de Brazilo. | |
| Br. 100,00. Enc. | 200,00 |
| Vivo de Zamenhof. Privat. Ilustr. | |
| Enc. | 180,00 |
| Vojaĝo al Kazohinio. Szóthmári | 400,00 |
| Zamenhof. Iniciador do Espe- | |
| ranto. López Luna-Domingues | 120,00 |
| Sciencaj Studoj. red. Neergaard | 450,00 |

NOVIDADES NO ANO ZAMENHOF

| | Cr\$ |
|---|--------|
| Zamenhof — Iniciador do Esperanto — Por A. Lopéz Luna — Tradução de Carlos Domingues — Edição dos Irmãos Pongetti — Biografia formosa e comovedora, que se lê como o mais atraente dos romances — A aparecer em fins de Novembro próximo | 120,00 |
| Ano Zamenhof — Edição em língua portuguêsã da interessante brochura comemorativa "Zamenhof-Jaro" — Tradução de Henerik Kocher.... | 10,00 |
| Setenta Anos de Esperanto — Por Ivo Lapenna — Tradução de Geraldo Pádua — Síntese magnífica da vida do Esperanto | 10,00 |
| Marcador de Livros — De rico tafetá, com o símbolo de louro do centenário — Muito próprio para presente | 50,00 |
| Lápis — Com dizeres comemorativos do Centenário de Zamenhof | 8,00 |
| Método Elementar de Esperanto — Por C. Torres Pastorino — 2. ^a edição revista — Preço especial no Ano Zamenhof | 120,00 |
| Exercícios do mesmo — Brochura destinada aos cursos pelo rádio..... | 30,00 |

—o()o—

Em todos êsses livros e objetos haverá o abatimento de 20% para compras de 10 ou mais.

As importâncias devem ser remetidas à Liga Brasileira de Esperanto de preferência em cheque bancário Para compras de menos de Cr\$ 100,00 haverá o acréscimo de Cr\$ 10,00 de despesa de remessa.

Brevemente

Inocência — Por A. Taunay — Tradução de Geraldo Pádua Edição da Biblioteca do Exército. Seguir-se-ão outras traduções de grandes obras da literatura brasileira.

Linguaphone — A B.E.L. está em entendimento com os agentes para a importação da matriz e gravação no Brasil da coleção de discos de estudo do Esperanto. O preço provável da coleção seria então Cr\$ 500,00 tudo dependendo naturalmente do volume de encomendadas. Comunique, pois, à B.E.L. o seu desejo de possuir os discos.

—o()o—

Todo esperantista deve ter interesse em adquirir livros e objetos de Esperanto não só para si próprio mas também para ofertar a amigos, a pessoas a quem pretende convencer, e às bibliotecas da sua cidade.

—o()o—

**SERÁ EMITIDO PELO DEPARTAMENTO DOS CORREIOS E TELÉGRAFOS
UM SÉLO POSTAL COMEMORATIVO BEM COMO EMPREGADO UM CARIMBO
OBLITERADOR COM A DATA DO CENTENÁRIO.**